

Tagiĝo 30

Cirkulero de Esperanto Junularo en ĈSR - eldonas: Dŭm Osvĕty, odbor Esperanto
redaktas: Kuzník Jaroslav, Rooseveltova 17, Opava 1956/II

MOSKVO RESPONDIS EN ESPERANTO.

(Laŭ la raporto publikigita en "Heroldo de Esperanto N-ro 3, februaro 56)

Ke la - laŭ pluraj vidpunktoj sensacia - sciigo pri telegrafa respondo de Molotov en Esperanto, publikigita en nia lastpasinta numero (Heroldo de E.), aperis tie en anguleto iom kaŝita, pri tio kulpas la fakto, ke nur lastmomente antaŭ la preso ni ricevis eltondaĵon el la Londona Ĵurnalo, el kiu ni ĝin ĉerpis. Sed krome, ni estis - kaj ankoraŭ estas - iom skeptikaj pri la vereco de tiu sciigo. La plena artikolo en "Sunday Times" de 22.1.1.956, de ĝia kunlaboranto Viator, tekstas en la Esperanta traduko:

MALANTAŬ LA KURTENO: MOSKVA RESPONDO EN ESPERANTO. La sekretario de la komunisteca "Japona Popola Konsilantaro por la restarigo de normalaj interrilatoj kun Sovetunio kaj komunista Ĉinujo" sendis antaŭ nelonge mesaĝon al Moskvo kaj Pekino, petante la kunlaboradon de la tieaj registaroj ĉe kampanjo entreprenata de la nomita organizaĵo. La kampanjo estas komencota la 17-an de marto en Tokio per kunveno.

Molotov respondis per telegramo, promesante sian subtenon al la kampanjo. Ĉi tio ne estis surpriza, sed eksterordinara estis la fakto, ke la respondo estis en la angla, kaj en Esperanto. Ĉi tio estis la unua fojo, ke soveta registaro rekonis Esperanton kiel internacian lingvon, kaj ŝajnas ke ĝi estas rekonata kiel tia de aliaj komunistaj registaroj.

Ekzistas nacia konsilantaro kun 14 Esperanto-rondoj en Hungarujo, kaj kongreso de Danubaj landoj estas okazigota en Bratislava en julio.

La hungara ministro de edukado decidis antaŭ nelonge permesi la formadon de Esperanto-rondoj en lernejoj. La sidejo de la Komunista Mondfederacio Junulara en Budapeŝt proponis Esperanton kiel unu el siaj oficialaj lingvoj por la venontjara Junulara Festivalo en Moskvo.

Klarigon por ĝis populareco donis hungara radio-parolanto, kiu priskribis ĝin kiel preparon por la tempo, kiam "sociaj kaj ekonomiaj baroj inter la popoloj estos rompitaĵ" kaj universala lingvo estos farita ebla.

Kiel dirite, ni ne tute fidas la verecon de la supra sciigo, kaj la respondecon pri ĝi ni devas lasi al "Sunday Times" kaj ĝia kunlaboranto Viator. Aliflanke "Sunday Times" ja estas serioza ĵurnalo. Estas eble, ke la sovetuniaj gvidantoj, ekkoninte la grandegajn avantaĝojn, kiujn povus doni al ili ĉe la sekvado de iliaj celoj la uzado de Esperanto, secidis mem ekuzi tiun promesplenan instrumenton, por doni per tio ekzemplon al siaj popoloj kaj ties amikoj kaj la instigon komenci vastan lernadon kaj disvastigadon de la internacia lingvo, por ilia propra profito kaj tiu de la tute progresema mondo.

En tiu ĉi rilato estas interesa ankaŭ la aserto de aŭskultinto ke Radio Wien disvastigis irinformon, laŭ kiu Molotov en letero al grava funkciulo en Britujo (ĉu Eden?) uzis Esperanton. Ankaŭ pri tiu ĉi aserto ni ĝis nun ne ricevis konfirmon.

Ni do ripetas: ni restas skeptikaj rilate al la vereco de supraj informoj, almenaŭ provizore. Tamen ŝajnas, ke en nia jarcento jam nenio estas neebla. Cetere, jam antaŭ iom da tempo ni aŭdis aludon ke, eble, post nelonge, Moskvo surprizos la mondon per sensaciaj faktoj pri Esperanto. Do ...?

P.S. - (de Heroldo) La supra artikolo jam estis kompostita, kiam ni ricevis la sciigon, ke la ĝenerala sekretario de la Japana Popola Konsilantaro, en telegramo el Londono konfirmis la verecon de la

informo pri la telegramo de Molotov. Multaj ĵurnaloj dume jam represis parte la artikolon de „Sunday Times” pri la Molotova telegramo aŭ simple publikigis la fakton.

II-a KONFERENCO DE POPOLDEMOKRATAJ ESPERANTISTOJ EN BRATISLAVA la 6-an ĝis 9-an de julio 1956.

(Laŭ la sciigo en TKKE informas, N-ro 2 - Februaro 56)

(Pluaj informoj sekvos nur post aprobo de la konferenco fare de komisiitejo kaj ministrio por kulturo)

TKKE dum sin konferenco en Olomouc decidis aranĝi konferencon de esperantistoj el popoldemokrataj landoj Irune kune kun la konferenco de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Laŭ la propono de Hungarlanda KKE estis komisiita aranĝi la konferencon Esperanto grupo ĉe Kleriga domo en Bratislava.

Esperantistoj en Bratislava volonte akceptis la aranĝon kaj faris necesajn preparojn. Estis elektita Loka konferenckomitato, kiu zorgos, ke la konferenco ĉiurilate sukcesu. Kompreneble oni kalkulis kun helpo de ĉiuj samideanoj.

Provizora programo:

La	6-an de julio 1956	(vendredo)	interkonatiĝa vespero
	7-an	(sabato)	antaŭtagmeze kaj posttagmeze laborkunsidoj vespere artprogramo.
	8-an	(dimanĉe)	antaŭtagmezo de eksterlandaj gastoj posttagmeze komuna laborkonferenco vespere artprogramo
	9-an	(lunde)	ekskursoj

Vesperajn artajn programojn prizorgos niaj artistoj el Praha, Brno, Olomouc kaj el aliaj lokoj.

La konferenco jam nun vekas grandan intereson ne nur en nia respubliko, sed ankaŭ en eksterlando. Ni estas informitaj, ke pri la proponata konferenco raportis la nederlanda preso.

Dr-ino M. Šaturová-Seppová

DIVERSAJ RAPORTOJ:

En Bulgario nia movado prosperas – skribas al ni la Junulara Sekcio de Bulgara E-Asocio. En decembro estis fondita la unua junulara esperantista Societo "Juneco" en nia lando. Krom ĝi en la Sofia Universitat kaj en la financekonomia instituto en la urbo Svištov funkcias Esperanto-rondoj. En deko da lernejoj estas kursoj de Esperanto. Do, en la movadon enverŝiĝas juna sango. 15.XII.1955 Radio Sofia disaŭdigis kvin minutojn pri la vivo kaj kreado de Zamenhof.

..... Ekspozicio en Písek.

Nia grupo en Písek aranĝas, laŭ invito de Dům Osvěty en Písek, ekspozicion de Esperanto. Solena malfermo okazos 16.3. je 18-a horo.

..... La 12-an de februaro okazis en Brno regiona konferenco de Esperanto Junularo. Sabate estis aranĝita jam tradicia maskobalo, kiun vizitis multaj samideanoj el kelkaj regionoj.

Konferenco estis malfermita je la 9-a horo en hoteloo SLOVAN. La kunvenon prezidis ano de Junularo Brno, Andrej Valjan, kiu tiel tiel anstataŭis neĉeestan regionan del. Olda Kaláb. Post kultura enmetaĵo de Junularo Brno estis tralegitaj letero de la Centrejo kaj raporto de RD. Plu estis pritaktataj kelkaj temoj, kiuj ne povis esti ĉiukaze definitive solvitaj, sed koncerne kiujn estis necese

klarigi ĝeneralan starpunkton de niaj grupoj. El la fina decido, kiu fontis el publika diskuto de la ĉeestantaro, ni prezentas kelkajn fragmentojn:

1. Konkurso: „Tagiĝo abonantoj“ - partopreno en ĝi.
2. Aranĝo de SET-1956 en Opava, krome ankaŭ en Třebíč.
3. Konferenco de Danubvalaj esperantistoj en julio 1956 en Bratislava.
Junularo en Bratislava ĉe tiu okazo organizos tutŝtatan konferencon de E-Junularo (post la aprobo de Centrejo)
4. Programan materialon disponi el kultura fakto de la Centrejo (Novobilský).
Junulatro Ostrava pruntedonos sian Esp. ekspozicion al Junularo Žďár n/ Sáz.
5. Nia Centrejo (aŭ pere de TKKE) postulu ÚV ČSM, ke nia reprezentanto estu delegita al Monda festivalo de demokrata junularo kaj studentoj okazonta en Moskvo.

Post trihora traktado estis la kunsido finita per E-himno. Partoprenis 40 gesamideanoj el Ostrava, Žďár n/Sáz., Přerov, Třebíč, Olomouc, Bratislava, Hradec Králové, Lanškroun kaj Brno.
(Laŭ la raporto de s. Werner)

..... De s-ano Imre Ferenczy sekretario de E-Junularo en Hungario ni eksciis, ke s-ano Nevrlý, kiu estas estro de la E-Junulara grupo en Olomouc proponas renkontiĝon je la landa limo kun hungaraj esperantistaj junuloj. Imre Ferenczy proponas tiun renkontiĝon en Komarno iam en majo. Tamen mia opinio estas prokrasti la renkontiĝon je Konferenco de Danubvalaj esperantistoj, kiu okazos en julio 1956 kaj estos pli grava. La renkonto de multaj gesamideanoj tie vere estos pli efika.

Kuzník

..... Regiona konferenco en Třebíč

Esperanta rondeto ĉe Dům osvěty en Třebíč kunvokas je 21. kaj 22-an de aprilo 1956 regionan junularan konferencon en Třebíč. Antaŭ konferenco estos organizita seminario de merkredo 18.4. ĉiam de 19 – 21-a horo. Pli detalajn informojn petu de Loka delegito Blanka Deňhalová, Pražská 496, Třebíč. Aliĝiloj estos dissendataj kun preciza programo en proksimaj tagoj. Partoprenu multnombre tiun ĉi konferencon.

..... KORESPONDI DEZIRAS:

19-jura k-d ino LE- TUYET-SON, Trúng-Vuong, Lop 3A, HANOI, Vietnam.
deziras ankaŭ interŝanĝi fotojn kaj insignojn.

K-do Hermann Liebelt, Magdelstr. 91, JENA, NDR.

35 komencantoj 10 - 14 jaraj deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn tutmonde. Adreso: Edukinstituto de MÁV. RÉPCESZENTAYÖRGY, Hungario.

..... Laborkunveno en Karviná por regiono Ostrava Olomouc okazis la 11-an de marto 1956.

SOMERA ESPERANTO TENDARO

Junulara Somera Esperanto Tendaro okazos denove tiu ĉi jare en valo de rivero Moravice en Silezio, kie jam pasigis sian libertempon junaj kaj aĝaj gesamideanoj el tuta respubliko tri foje dum pasintaj jaroj.

Ĉi somere estas aranĝata tendaro en du etapoj:

Unua etapo	–	15.7. – 28.7.1956
dua etapo	–	29.7. – 11.8.1956

En ambaŭ etapoj partoprenos kelkaj samideanoj el eksterlando. Pro tio ni esperas fari la tendaron vere modelan kaj ankoraŭ pli bone organizitan ol en pasintaj jaroj.

Fine de unua etapo estas entreprenita dutaga ekskurso aŭtokare tra montaro Jeseníky kaj

krom iliajn signifoplenajn kaj interesajn lokojn ni vizitos: Jánské Lázně, Vadigon apud Kružberk, Jeseníky, Praděd, karstajn grotojn: Na Pomezí, lagetojn „Rejvis“, Javorník.

Tiu ĉi aŭtokara ekskurso estos entreprenita la 27,-28-an de julio, kaj povas ĝin partopreni ankaŭ samideanoj kiuj aliĝos por la dua etapo, kondiĉe se ili alveturos la 26-an de julio.

Ekskurson povas partopreni nur tiuj kiuj por ĝi aliĝos deonante alpagon kiun ni laŭ la nombro de partoprenantoj kalkulos kaj pri ĝi ni donos ankoraŭ informojn.

Prezo por la 14-taga restado en tendaro restos sama kiel en pasintaj jaroj t.e. ĉirkaŭ Kčs 200 - 220,-

Al la SET povas aliĝi nur tiuj samideanoj, kiuj absolvis iun Esp.-kurson almenaŭ de kat. A. en la grupoj.

En dua etapo povas interesuloj submeti sin al ekzameno de pli supera kategorio (kapablo instrui Esp-on)

En la kursaro verŝajne instruos: s-anoj Echtner, Mařík, Novobilský, Kočvara Dr., Th. Killián, Raška, Werner Jan kaj aliaj.

Amuza programo dum la kursaro: Somera karnavalo, banado en la rivero.

La vivo en la tendaro estos verŝajne ĉi jare filmita ĉar ni atendas vere altan nivelon de SET 1956.

Instruado en antaŭtagmezaj horoj, meznombro 4 horojn tage. Instrutekstoj estos parte multobligitaj.

Loĝadu sub tendoj: krome ni agas pri la lupreno de proksima arbaristejo, kiu estas 200 m de tendarejo.

Ĉar la plej granda nombro de partoprenantoj en la kursoj de unu etapo estas nur 40 personoj estas necese jam nun elekti inter tiuj, kiuj interesas pri la partopreno. Tial ni petas la Lokajn Delegitojn pridiskuti tiun ĉi demandon kaj la grupoj sendi la raporton pri la nombro kaj nomojn de samideanoj, kiuj intencas SET partopreni, al siaj regionaj delegitoj, kiuj poste amase la raporton de ĉiuj grupoj en la regiono sendos al la redakto de Tagiĝo en Opava.

Aliĝilojn en la kursojn sendu plej malfrue al Opava la 15.4.1956.

Tiuokaze, se estos multe da aliĝiloj oni eble aranĝos ankoraŭ unu Tendaron en alia loko, eble grupo en Třebíč (apud Valdigo Vranov).

En baldaŭa tempo estos organizita la INFORMEJO de SET 1956, kiu respondos ĉiun vian demandon. (Adreson ni komunikos al vi ĝustatempe).

Viaj fruaj aliĝiloj helpas al bona, senĥaosa organizado kaj al via kontenteco el sukcese preparita tendaro.

Memoru, ke nur du homoj ĉion preparas, ŝparu iliajn fortojn!

De s-ano Oldřich Schwetter, učitel, Havířov 1, blok 14/67, ni ricevis leteron, kiun ni represas, kaj ni petas samideanajn subtenojn lian penon enpenetri Esperanton en gazetaron.

"Per propagandi nian lingvon mi entreprenis dum pasintaj tagoj jenon- La 20-an de februaro 1956 mi skribis al redakcio de Mladá Fronta jenan leteron:

""Estimataj kamaradoj!

Kun granda intereso mi atente sekvas en Mladá Fronta rubrikon "Jak to je? (Kiel ĝi estas?) kaj mi tre ŝatas apportaĵon kiun ĝi donas al mi por mia instruista okupo. Kamaradoj, vi tre bone plenumas vian taskon klerigi kaj kompletigi klerigon de larĝaj amasoj de legantoj de Mladá Fronta.

Lastatempe kelkfoje aperis en ĉiutaga preso vorto „Esperanto“. La 9-an de februaro 1956, en rubriko „ĉiutagaj raportoj“ en Mladá Fronta, mi legis malgrandan raporteton kun surskribo „Ili lernas Esperanton“, ... kiu estas bona komprenilo.

Post kelkaj tagoj, la 12.2.56 en radio, en elsendo por ĉeĥoslovkaj pioniroj, en "Pionýrská Jitřenka", mi aŭdis denove pri Esperanto. Pioniroj skribos leterojn pri sia vivo, poste ili estas tradukotaj Esperanton kaj sendataj Japanujon, kie oni eldonas ian libron pri la vivo de ĉeĥoslovkaj geknaboj.

El tiuj nekompletaj raportoj mi konkludas, ke "Esperanto" do estas ia lingvo, sed al kio kaj al kiu kaj por kiu celo ĝi servas, kiu scipovos ĝin ... ktp., tion mi ne scias kaj mi tre dezirus scii kaj kun mi verŝajne la tuta vico da legantoj, kiuj atente sekvadas raportojn en Mladá Fronta.

Do mi petas vin, ke vi estu tiel afablaj en via rubriko "Jak to je?" klarigis la sencon de vorto „Esperanto“ kaj ĉion kio kun ĝi interrilatas.

Mi esperas, ke vi plenumas mian demandon kaj plivastigas tiamaniere ne sole miajn sciojn, sed sciojn de la tuta vico de legantoj.

Salutas vin O.Schr.

Do tian leteron mi skribis al Mladá Fronta kaj post kelke da tagoj mi ricevis jenan respondon:

“”Estimata kamarado!

Ni dankas al vi pro via demando. Vi estas jam la dua, kiu demandas ĉi tiun aferon. Ni respondos ĝin sur unu el venontaj paĝoj “Jak je to?”

Kun kamarada saluto””

La devo de ĉiuj esperantistoj-legantoj de M.F. estos regule atente sekvi la ĉiudimanĉan ekzempleron de M.F.

Antaŭ la respondo de M.F. povus ankoraŭ kelkaj gesamideanoj simile peti M.F., ke ili respondu, kio estas “Esperanto”. Sed skribu nur tiuj, kiuj ne estas konataj ĉe redakcio de la M.F. (Praha II., Panská 8), kiel esperantistoj.

Post la respondo de M.F. en iu dimanĉa ekzemplero, nia plua agado dependos de favora aŭ malfavora respondo. Se la M.F. respondos malfavore por Esperanto, ni ĉiuj povas leteronti al M.F. per bonaj argumentoj, precipe politikaj, pacdefendantaj, pri sukceso en UNESCO ktp. Se M.F. respondos favore por Esperanto, ni povas postuli de M.F. iajn specialajn demandojn, taskojn aŭ petojn, ekzemple, ke la dimanĉa ekzemplero de M.F. enhavu Esperantan skribkurson, ktp.

INFORMOJ:

Malgraŭ tio, ke ni tre rapidegis kun la eldono de la lasta Tagiĝo n-ro 29 (pro tio aperis en ĝi multaj misskriboj kaj gramatikaj eraroj, ĉar ĝi estis tajpita de personoj kiuj ne regis Esperanton) kaj ankaŭ ĝi estis la 20-an de januaro tute preta por la preso, tamen preparita sur la folioj kuŝis la eldonota cirkulero en presejo de unu nacia entrepreno en Opava. Neniu urĝiĝoj helpis plirapidigi la ĝustatempan eldonon. Krome aperis ankoraŭ multaj aliaj malfacilaĵoj kiuj kulpis ke estis tiel longe ekzamenata via pacienco.

Al la legantoj!

Mi bedaŭras, ke en la pasinta numero estis tro multaj lingvaj eraroj kaj miskriboj. Ili ankaŭ, sen mia kulpo, grave trafis miajn raportojn kaj la leteron de d-ro Kamarýt. Mi atentigas almenaŭ pri kelkaj el la eraroj, kiuj ŝanĝis la sencon (inter krampoj estas la malĝustaĵo).

1-a paĝo: direktita (direktita); pluraj delegitoj (pluaj); reporti entuziasmon (raporti);

2-a paĝo: (Rokycany) eksoldatiĝis (eksoldatiĝis);

3-a paĝo: imitindaj admonoj (ne “ordonoj”!)

5-a paĝo: enmigrintoj (emigrintoj) elektitoj por iu funkcio (ne “tiu”);

(Japonští vědci): inter “jazyk” kaj “zveřejňování” metu “pro”.

Jar. Mařík.

Konkurso: “TAGIĜO ABONANTOJ”.

Ĝis nun abonis kaj antaŭpagis Tagiĝon 260 ges-anoj. Krome ni forsendas Tagiĝon al pluaj 200 s-anoj, kiuj ankoraŭ ne pagis aŭ ili apartenas al diversaj s-anoj en eksterlando, al redaktejoj de

gazetoj kaj cirkuleroj (interŝanĝe). En eksterlandon ni forsendas 71 numerojn de Tagiĝo.

Ni publikigis nombrojn de varbitaj abonantoj de Tagiĝo en unuopaj regionoj. Estas neeble pritaksi la Reg. delegitojn persone, ĉar en ĉiuj kazoj ili ne kontribuis persone en varbado de abonantoj. Plej multe ni dankas al RD s-ano Kočvara Dr. kaj Karel Franc, kiuj pruvis sian plej grandan aktivecon. Jen la rezultoj:

1. loko – Regiono Ostrava-Gottwaldov – RD Kočvara Dr.	61
2. loko – Reg. Pardubice, Liberec, Hr. Králové – RD Franc	38
3. loko – Regiono Brno – Jihlava – RD Kaláb	34
4. loko – Reg. Praha – K. Vary. Ústí n/Lab – RD Novotný	33
5. loko – Reg. Plzeň – RD Hořejší	25
6. loko – Reg. Olomouc – RD Fabián	24
7. loko – Reg. Č. Budějovice – RD Křivánek	18
Abonoj el ceteraj lokoj (Slovakio kaj alie)	27

Entute pagitaj abonoj	260

Al ĉiuj, kiuj helpis en la varbado, ni esprimas elkoran dankon. Tamen ni esperas, ke tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis kaj Tagiĝon ricevadas, konfirmos almenaŭ per poŝtkarto, ĉu ili deziras ĝian alsendado. Eventualajn pagojn direktu al konto: Kuznik Jar., STSP Opava, čís. 855.
Jarabono de Tagiĝo Kčs 12,-.

ATENTIGO!

Ni denove atentigas, ke presa eldono de Tagiĝo aperos meze de majo. Raportojn, artikolajn kontribuojn por Tagiĝo sendu almenaŭ 3 semajnojn antaŭe. Pretigo de Tagiĝo kaj ĝia presado estas tre malfacila.